


Kataluna Esperantisto



**NUMERO 327 (93)
KVINA EPOKO
JULIO-SEPTEMBRO
2003**

**Frederic Pujulà i Vallès,
40 jarojn poste**

Apologia artikolo

Aliĝo al denunco

Redaktoro de Etnismo

Epokfara verko

Tempesto super IEA

KEA dungas animanton

ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO



KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

Frederic Pujulà i Vallès, escriptor, catalanista i esperantista

*FRANCESC POBLET
HISTORIADOR*

Francesc Poblet i Feijoo, que està preparant la seva tesi doctoral en Història Contemporània sobre el moviment esperantista a Catalunya, ens apropa a la biografia d'un personatge polifacètic, considerat l'introductor i màxim difusor de l'esperantisme a Catalunya, en el quarantè aniversari de la seva mort.

pàgina 11 ↻



Dibuix de Pujulà fet per un jove Picasso l'any 1900. Pertany a una sèrie de dibuixos de personatges i amics que freqüentaven la cerveseria Els Quatre Gats de Barcelona



**Nur multaj
per sia eta ero,
eblas funkciigi
asocion**

Somero malofte alportas novaĵojn ĉe ni, sed ĉi tiu fariĝis escepto, ne kvanta sed kvalita. La Plenumkomitato de KEA decidis fine enpaŝi kaj proponi la dungadon de animanto, kvankam –kiel vi povas legi sur la paĝoj de nia bulteno– la ekonomia flanko de la veto ankoraŭ ne estas plene solvita.

Tia afero ne okazos por la unua fojo en nia movado. En decembro de 1986 Centro de Esperanto Sabadell dungis aktivulon profitante tiaman subvencion de la kataluna registaro. Dum du jaroj sinsekve enoficiĝis unue Hektor Alos kaj poste Arnau Torras, sed oni ne plu proponis la subvencion. Aliflanke, ankaŭ la humanitara organizo Espero enpostenigis dum unu jaro Gemma Armadans por aktivigi sian agadon. El ĉio ĉi, oni akiris spertojn, kiuj nepre tre helpas por tiu nova ĉapitro de nia movada historio.

La celo de tiu iniciato estas multobligi la aktivadon de la asocio. Unuflanke, ni deziras oftigi niajn aranĝojn –denove ĉiujarigi la kongresojn kaj okazigi ankaŭ aliajn renkontiĝojn dum la jaro–, sed ankaŭ vastigi la servojn al la membraro. Aliflanke, necesas havi pli fekundan inform-agadon.

Dungito, kiu certigas kelkdekon da laborhoroj semajne, ne solvas la problemojn, ĝi nur helpas. Ĝi tamen povas fariĝi mem problemo, se movadanoj malstreĉas sian aktivadon pretekste, ke jam ekzistas iu, kiu okupiĝas pri ĉio. Male, esenca tasko kaj de la dungito kaj de la estraro estas vastigi la reton de kunlaborantoj: nur tiel, multaj per sia eta ero, eblas funkciigi asocion. Eĉ guto malgranda...

Hektor Alos i Font

Junia kotiz-kampanjo

Ni elkore dankas ĉiujn respondintojn al nia kampanjo por memvola altiĝo de la kotizoj. Ni atingis preskaŭ 1000 eŭrojn, sed la asocia plenumkomitato taksas, ke ni bezonas pli ol la duoblon por certigi la planitajn celojn. Konsiderante la sufiĉe bonan reagon kaj la iom maltaŭgajn somerajn datojn, ĝi denove kunsendas la cirkuleron al nia membraro kun la peto, ke vi resendu ĝin plenigita.

Campanya de quotes de juny

Agraŭm de tot cor a tots els qui han respost a la campanya de juny per a augmentar-se voluntàriament les quotes. Hem arribat gairebé als 1000 euros, però la junta de l'associació considera que cal més del doble d'aquesta quantitat per a assegurar els objectius previstos. Considerant la reacció prou bona dels nostres consocis i les poc favorables dates estiuenques, us tornem a adjuntar la mateixa circular amb el prec que en la torneu omplerta.

En ĉi tiu numero kontribuis per novaĵetoj Manuel Casanoves, Josep Franquesa, Joan Inglada, Christian Pinard, Pep Pou, Llibert Puig kaj Luz Vázquez.

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL, Literatura Foiro, Heroldo, La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Litova Stelo, Ret-Info, Scienca Revuo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 SABADELL (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto-ct.org
Ret-paĝo: www.esperanto-ct.org
Ret-listo: nia_listo@esperanto-ct.org

Kotizoj por la jaro 2003: Individua Abonanta Membro 25 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 50 eŭroj; Individua Dumviva Membro 500 eŭroj; Kolektiva Membro 50 eŭroj; Juna Membro 16 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; vicprezidanto: Joan Inglada; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatanoj: Anna Casasús, Xavier Margais, Arnald Massanas.

Kontrola Komisiono: Sebastià Ribes, Òscar Puig, Xavier Murcia.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Mateu Vic; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Impres a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Nia agado

Apologia artikolo

La 27an de majo la ĵurnalo *El Punt* aperigis tute poresperantan artikolon de sia kunlaboranto, la ĵurnalisto Pius Pujades. En ĝi la aŭtoro komparas la neceson enkonduki komunan mon-unuon en Eŭropan Union kun la alpreno de komuna lingvo neŭtrala kaj facila. Li asertas, ke same kiel eŭro evitis al la eŭropaj civitanoj dependi de la dolaro, esperanto permesus eviti la superregon de la angla en la tuta kontinento “iu angla, krome –li klarigas–, kiu ne estos tiu de Ŝekspiro aŭ de Truman Capote, sed speco de krom-produkto pli artefarita ol la lingvo de la surduloj”. Por tio li subtenas esperanton, por “ne daŭre suferi la uzon de la lingvo kiel armilo por konfronto kaj trudrego inter niaj popoloj”.

Historiaj dokumentoj

La revuo pri historio *Sàpiens* donacas kolekteblajn reproduktajn de dokumentoj kuŝantaj en la famiĝinta arkivo de Salamanca. En la julia numero estis distribuata kvar-paĝa depreso kun la titolo *'Esperantistes del món, uniu-vos'*. La frontpaĝo tre bone prezentas la esperanto-movadon kaj enkondukas la fotografiajn reproduktajn kuŝantajn en la sekvaj paĝoj: nomumo de Albert Carsí kiel honora membro de la esperantista societo Nova Sento, el Poble Nou (Barcelono), kaj paĝoj de du numeroj de la bulteno de tiu asocio. La Arkivo de la Intercivitana Milito de Salamanca stariĝis fare de la faŝisma armeo surbaze de la rabado de arkivoj de urboj, aŭtonomaj registaroj, sindikatoj kaj aliaj organizoj por subpremi la politikajn kaj sociajn aktivulojn de la demokratia periodo.

mc/red

Kongresaj artikoloj

Okaze de la Universala Kongreso, la Brusela Komunikad-Centro organizis mondan gazetaran kampanjon. Sur tiu bazo Luz Vázquez sukcesis publikigi du artikolojn, en *Spais7* kaj *Diari de Reus*. *Spais7* estas senpaga amase distribuata revuo kaj la artikolo aperis tre videble sur la tuta lasta paĝo.

lv/red



Respondeculo pri informiloj

La famiĝinta arkivo de Salamanca

Arnau Massanes transprenis la taskon zorgi pri la esperanto-informiloj: ĉu ili estas aktualaj, ĉu mankas, ĉu ili elĉerpiĝu aŭ ĉu necesas krei novajn.

Sen publiko en Sabadell

La 17an de junio estis anoncita prezento de la libro *Amb l'esperanto a la motxilla* en la nova kaj impona biblioteko “Vapor Badia” de Sabadell. Malgraŭ anonco en la kluba bulteno kaj afiŝo en la biblioteko, alvenis por la aranĝo nur la prezidanto de Centro Esperanto Sabadell kaj lia edzino. Laŭ klarigo de la bibliotekestro, ne por la unua fojo tiel okazas, eble ĉar la ejo tre junas kaj mankas al ĝi tradicio kaj konstanta partoprenantaro; aliflanke verŝajne mankis diskonigo tra la lokaj komunikiloj. Oni tamen profitis la okazon por donaci al la biblioteko ekzempleron de la libro, kiu akompanos la katalunan tradukon de “Zamenhof, autor de l'esperanto” de Marjorie Boulton, jam donacitan okaze de ties fondiĝo.

Lp/red

Dorsosakulo en Reus

La 18an de junio Manel Vinyals prezentis sian libron *Amb l'esperanto a la motxilla* en Centre de Lectura, la plej grava kultura centro de Reus.

La prezidantino de ties literatura sekcio, kiu disponigis senpage la ĉefan salonon, prezentis la prelegonton. Sed kvankam oni anoncis la aranĝon en la prestiĝa asocia revuo, dissendita al proksimume 3000 anoj, nur deko da homoj profitis la ŝancon aŭskulti pri interesa vojaĝo per atentokapta parolmaniero. Bedaŭrinde.

lv

Libroprezento en Lleida

La 19an de julio, Manel Vinyals prezentis en la publika biblioteko de Lleida sian libron *Amb l'esperanto a la motxilla*. Pli ol dek homoj ĉeestis la viglan kaj interesan prelegon kun multaj lumbildoj.

jf/red

Nur kelkaj sed parolemaj

Brian Kruegger, loĝanto en la disfamiĝinta okupaciita domo Can Masdeu en Barcelono, helpe de komputila prezentado, vigle kaj atentokapte rakontis pri la loĝej-okupacia movado en Barcelono la 28an de junio en Amikoj de Unesko en Barcelono. Bedaŭrinde la aŭskultantaro estis magra: nur kvar homoj (verŝajne parte kulpis la kelktaga malfruigo de la lasta numero de *Kataluna Esperantisto*). Tamen, se la prelego daŭris iom pli ol unu horo, la posta diskutado-babilado, ne malpli interesa kaj riĉiga, fariĝis eĉ pli longa, laŭ posta kontrolo de la horloĝoj.

Renkontiĝo en Prada

Okaze de la Kataluna Somera Universitato en Prada de Conflent renkontiĝis Mon Cardona, Jaume Elias, Christian Pinard, Dolors Oller, Lluís Aragay kaj Vicky Valudes. (Foto)



Feminisma teologio

Hedwig Fischer prelegis en agrabla amika etoso la 8an de aŭgusto pri feminisma teologio. La aranĝon, organizitan de KEA, dankinde gastigis Barcelona Esperanto-Kontaktejo.

Sufiĉe buntekreda okopo pli ofte babilis ol pasive aŭskultis pri la bildo de la virino en la biblio, la sinteno de la romkatolika eklezio pri la virinoj, la rolo de la virinoj en tiu eklezio kaj pri multaj flankaj aspektoj de ekumenismo, historio de kristanismo, religiaj progresismo kaj konservativismo, ktp. Plezurplena vespero! Espereble neniu taksos ĝin peko.

pp

Internacia etoso

Kiel tradicie, Centro de Esperanto Sabadell okazigas jaran kursfinan vespermanĝon en sia sidejo, al kiu ĝi klopodas venigi eksterlandanojn por garantii ties internaciecon. Ĉi-jare la kunveno estis ege speciala, ĉar partoprenis kvar eksterlandanoj: du usonanoj (Sergio kaj Tomaso), unu rumanino (Elena) kaj unu senegalano (Jean-Christophe Badiate). Ili garantiis la uzadon de esperanto kaj igis la etoson tre amikeca kaj vigla.

lp

Aliĝo al denunco

La profesoro pri filozofio en la universitato de Ĝirono, Josep Maria Terricabras, prezentis antaŭ la hispana kasacia kortumo denuncon kontraŭ la vicministro pri Sporto, Juan Antonio Gómez Angulo, la ministro pri Internaj Aferoj, Ángel Acebes, kaj la ministrino pri Kulturo, Pilar del Castillo. Li akuzas ilin atenci la konstitucian principon pri subtenado de la lingva diverseco en la ŝtato, pro ties malhelpoj uzi la eŭskan dum la lasta *Tour de France*. La hispana registaro laŭte kaj malkaŝe premis la organizantojn de la bicikla kurado, ĝis ili fine rompis la interkonsenton kun nord-eŭskaj kulturaj asocioj por uzi la eŭskan lingvon en etapo traironta la francan Eŭskion, pretekste ke unu el tiuj organizaĵoj, laŭ la hispana registaro, subtenas terorisman, kvankam ĝi estas tute laŭleĝa trans Pireneoj.

Antaŭ ol lanĉi la denuncon, Terricabras diskonigis sian intencon en radio-programo kaj tuj rikoltis grandan kvanton da aliĝoj, tiel ke fine li decidis elpaŝi. Kataluna Esperanto-

Asocio estis unu el tiuj pli ol mil asocioj subtenintaj lian iniciaton.

Kontraŭ pri-programaraj patentoj

Kune kun elstaraj organizoj, ĉefe en la tendaro de la libera programaro, KEA aliĝis al la protestoj kontraŭ la direktivo por la patentoj en la programaro, voĉdonota la venontan 1an de septembro en la Eŭropa Parlamento. Ĝi “fermis” sian TTT-ejon la 27an de aŭgusto kaj afiŝis klarigan mesaĝon en esperanto kaj la kataluna pri la celoj de la protesto.

Brusela Komunikad-Centro

Kiel pasint-jare KEA decidis libervole subvencii la Bruselan Komunikad-Centron de Universala Esperanto-Asocio kaj Eŭropa Esperanto-Unio per 100 eŭroj. BKC elstaras per la verkado de ĉiutagaj profesiaj artikoloj pri esperanto kaj lingvaj problemoj kaj kunordigas internaciajn gazetkampanjojn. Bedaŭrinde ĝi krizas pro manko de financa subteno fare de ties patronoj. KEA, ne estanta membro de tiuj organizoj, ĝiras la monon ne nur altruisme, sed ĉar ankaŭ ĝi ĝuas la bonegajn servojn de la centro.

Centjariĝa broŝuro

Francesc Poblet, doktoriĝanto pri historio per tezo pri la kataluna antaŭmilita esperanto-movado, transprenis la taskon verki broŝuron pri la periodo ĝis la jaro 1908. Ĝin KEA planas eldoni fine de la venonta jaro, por rememorigi la centjariĝon de la kataluna esperanto-movado. Kunlaboremuloj bonvolu sin turni al li: francesc19@yahoo.com

Monda parlamento por la 21a jarcento

La NRO Alianco por Respondeca, Plurala kaj Solidara Mondo lanĉis meze de 2002 projekton pri Monda Parlamento. Ĉi tiu organizaĵo naskiĝis surbaze de platformo redaktita en 1993 kaj grupigas aktivulojn el multnombraj asocioj kaj kolektivoj en 115 landoj. Ĝi ĉefe celas fariĝi forumo por komune diagnozi, alpreni komunajn valorojn kaj principojn kaj interkonsenti pri prioritatoj kaj strategioj.

La projekto pri Monda Parlamento ĝuste situas en ĉi tiu perspektivo. Temas pri longa projekto, laŭ pluraj fazoj, kuniganta kiel eble plej multajn homojn el la plej diversaj

movadoj dezirantajn komune pensi kaj pri la nuna mondo kaj kiel starigi realan mondan demokration, surbaze i.a. de parlamento kaj efektiva kaj evoluanta internacia juro.

Inter oktobro 2002 ĝis aprilo 2003 ĉ. 250 homoj partoprenis la retajn diskutojn de la unua fazo de la projekto. La ĉefaj lingvoj estis la angla, franca kaj hispana, tamen aliaj lingvoj uziĝis apude: la fina dokumento aperis en 11 lingvoj, inter kiuj esperanto kaj la kataluna.

Respondeculo de ĉi tiu iniciato, juna kataluno loĝanta en Francio, kontaktis kaj UEA-n kaj KEA-n en junio 2002 por esplori la eblecojn enkonduki esperanton kiel oficialan diskut-lingvon. La afero poste ne prosperis, sed kiam la diskutoj komenciĝis aŭtune, KEA estis invitita havi delegiton. Nia vicprezidanto, Joan Inglada, iel fariĝis la proparolanto de la asocio –kvankam neformala, ĉar ni ne havas starpunkton pri multaj el la diskutitaj aferoj, nek formalan reprezentigon oni postulis. Cetere, li ne estis la sola esperantisto: ekzemple ankaŭ la prezidanto de UEA, Renato Corsetti, partoprenis.

La diskutoj viglis kaj inter ili la problemo de la komuna lingvo en onta Monda Parlamento. Oni diskutis pri Esperanto kaj Ido, kvankam fina decido ne estis alprenita. La forumo konsistas el reta diskutlisto, en la angla, franca kaj hispana lingvoj, kiu funkcias nur per maŝina tradukado.

Kataluna Esperanto-Asocio
serĉas

Aktivulon por profesie labori duontempe por la asocio.

Elasta labortempo.
Plejparte eblas labori de hejme.

Postuloj:
- bonaj scioj de la kataluna kaj de esperanto,
- sperta uzado de komputilo,
- iniciatemo.

Kandidatoj bonvolu sendi vivprotokolon al kea@esperanto-ct.org
aŭ Apartat 1008, 08200 Sabadell antaŭ la 15a de novembro.

Aldoniĝos aliaj listoj en aliaj lingvoj, kiuj poste povos fariĝi regionaj grupoj por monda demokratio, sed tio dependos de la aliĝnombro.

La unua fazo finiĝis aprile. Oni decidis iom paŭzi (i.a. por serĉi financadon, ĉar la ekzistanta finiĝis), kaj la forumo devus ekpaŝi al pli konkretaj decidoj kaj dokumentoj. Oni invitas ĉiujn aliĝi al la forumo kaj subteni la organizan procedon en la nun komenciĝanta 2a fazo (junio - septembro 2003). Bonvolu legi ĉe www.alliance21.org/forums/info/world-parl#Esperanto kaj laŭvole peti aliĝon al germa@alliance21.org aŭ robineagle@worldcitizen.org

ji/red

KTP ne brazilumis

La muzikensemblo Kaj Tiel Plu ne povis okazigi sian anoncitan turneon en Brazilo pro lastmomenta rezigno de unu el la patronaj firmaoj.

Redaktoro de Etnismo

Arnau Massanes fariĝis redaktoro pri specialaj numeroj de *Etnismo*, la informilo pri etnaj problemoj de la Internacia Komitato pri Etnaj Liberecoj. Post pli ol 20 jaroj kiel redaktoro de la revuo, la platdiĉo Uwe Joachim Moritz transdonis la stafeton al la romandino Nicole Margot, nova ĉefredaktoro, kaj al nia samasocio. Lia unua numero okupiĝos, kompreneble, pri la Kataluna Landaro.



Miguel Gutiérrez prezentas la Grandan Vortaron Hispana-Esperantan.
Foto: Manolo Parra

La municipaj elektoj en Monato

Monato aperigis en sia septembra numero unu-paĝan artikolon pri la municipaj elektoj en Katalunio fare de sia regula kunlaboranto Hektor Alos i Font.

La internacia magazino tamen ne zorgas nur pri politiko. La ĉefartikolo de la antaŭa numero, ankaŭ ĝi verkita de nia kunmembro, detale klarigis en tri paĝoj kiel funkcias la mezurado de la televida spektantaro. Alos laboras kiel komputilisto en merkat-esplora multnacia konzerno okupiĝanta ĝuste pri tiu fako.

Surpriza omaĝo

En la posttagmezo post la prezentado de la hispana-esperanta vortaro estis enprogramita beletra ronda tablo kun la partopreno de elstaraj iberaj aŭtoroj kaj la italo Giulio Cappa. Iom post iom evidentiĝis, ke la celo estis iom alia, nome omaĝo al Miguel Gutiérrez Adúriz, senlaca aktivulo, redaktoro de la bulteno de la Hispana Esperanto-Federacio, eldonisto de la scienfikciaj kolektoj *Sferoj* kaj *Orbito Nula*, aŭtoro de hispana-esperanta dudirekta poŝvortaro, elstara tradukisto kaj prozisto, kaj membro de la iberia kvaropo aŭtorinta la poemaron *Ibere libere* kaj novelaron *Ekstremoj*. Tio, ke la omaĝito sciis nenion estis aparte kortuŝa ne nur por li, sed ankaŭ por la same mirplena publiko. Partoprenis en tiu simpatia maskerado, kaj kontribuis al la elektronika libro tiucele eldonita, nia samasocio Abel Montagut.

Epokfara verko

Julie, dum la hispana esperanto-kongreso, estis prezentita la Granda Vortaro Hispana-Esperanta de Fernando de Diego. Temas pri imponiga preskaŭ 1300-paĝa eldonaĵo, preskaŭ identa laŭ ekstera aspekto kaj dimensioj al la nova Plena Ilustrita Vortaro, kaj samnivela al la grandaj tradukaj vortaroj en la naciaj lingvoj.

La vortaro ĝisfunde esploras ĉ. 50 000 kapvortojn kaj elstaras super ĉiu antaŭa esperanto-verko per la vasteco kaj riĉeco de la frazeologio: por miloj da esprimoj, parolturnoj kaj proverboj eblas trovi esperantajn ekvivalentojn, ne malofte eĉ plurajn.

Ne eblis pli kompetenta aŭtoro ol Fernando de Diego, tradukinto de i.a. *Don Kihoto*, *Cent jaroj da soleco*, *Tirano Banderas*, *La familio de Pascual Duarte*, *Cigana romancaro* aŭ la

mirinda poem-antologio *Sentempa Sinfonio*. Li elstaras kiel majstra stilisto kaj detaligas siajn opiniojn en la eseoj *Pri esperanta traduk-arto* kaj *Pri literatura kritiko*.

Iom surprizas trovi en la interna kovrilo, ke la vortaron reviziis diversaj homoj, ĉe-kape la venkinto en la Belartaj Konkursoj kaj akravida kritikisto Antonio Valén, sed ankaŭ ne malpli famaj nomoj kiel Jorge Camacho, Miguel Fernández, Miguel Gutiérrez, Gonçalo Neves kaj Ricardo Felipe Albert Reyna. Ankaŭ du katalunoj listiĝas inter la kontribuintoj: Hektor Alos kaj Daniel Rubió.

La prezento de la verko dum la kongreso, fare de ties eldoninto Miguel Gutiérrez Adúriz, tute tenis la nivelon de la verko. Verŝajne neniu esperanto-libro iam havis tiel teknike bone zorgitan kaj lerte reĝisoritan publikan prezenton kiel ĉi tiu (malgraŭ la fuŝoj kaj mallertoj de la kongres-organizantoj).

La vortaro permesas de nun kvalitan salton al la hispan-lingvaj esperantistoj, ĉar ĝi estas eksterordinara rimedo por ellerni esperanton, malkiel ĉiuj ĝisnunaj hispanaj



Jorge Camacho kaj Antonio Valén

(kaj katalunaj) esperanto-vortaroj celintaj nur komencantojn. Roman-lingvanoj povas fieri, ke verŝajne la du plej elstaraj naciaj-esperanto-vortaroj estas iliaj: la itala de Carlo Minnaja kaj la hispana de Fernando de Diego.

Interreta rubriko

La usona esperantisto Donald J. Harlow ricevis dum la Gotenbarga UK la premion Deguchi, pro sia vasta laboro por esperanto en Interreto. Interalie, li kreis la liston "Reago", por faciligi la respondojn al nacilingvaj gazetaraj artikoloj pri nia lingvo (reago-subscribe@yahoogroups).

Li ankaŭ enretigis ampleksan kolekton da esperantaj literaturaĵoj donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html

Nun eblas legi rekte en la oficiala retpaĝaro de *Le Monde Diplomatique* la plej interesajn artikolojn de tiu prestiĝa monata revuo en esperanta versio: eo.mondediplo.com. Speciale rekomendindas la artikolo de ties direktoro Ignacio Ramonet en eo.mondediplo.com/article787.html

Daŭre kreskas la nombro de retaj informiloj en nia lingvo. Laste aperinta, kun tre interesa enhavo, estas *Libera Folio*: folio.xrs.net

Tradiciaj paperaj revuoj en nia lingvo aperas nun ankaŭ rete. Kiel sciante, *Kataluna Esperantisto* troveblas en la retpaĝo de KEA www.esperanto-ct.org

Nun la veterana, baldaŭ 100-jara, *Espero Katolika*, estas legebla en www.ikue.org

La fama reta gramatiko PMEG (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko), de la akademiano Bertilo Wennergren, atingis sian version 12.1: www.bertilow.com/pmeg

Pluraj kanzonoj en esperanto, luditaj de brazilaj artistoj, estas elŝuteblaj laŭ formato MP3 el la retpaĝaro de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj de Rio-de-Ĵaneiro: www.kke.org.br, esperanta fako, rubriko "Muzikaro".

Aliflanke, eblas aŭskulti dum 24 horoj, tage kaj nokte, esperantan muzikon en www.radio-esperanto.com

Pola Radio aktualigis sian retpaĝaron. Pere de ĝi estas nun pli facile atingi rete ĝiajn elsendojn en esperanto de unu kompleta semajno, por tuja aŭskultado aŭ por gardado en la propra disko. Nun eblas uzi la sistemojn Real Player kaj Windows Media: www.radio.com.pl/polonia

Darío Rodríguez

Lingva angulo

Cu oni akuzu la akuzativon?

Kiomfoje ni cerbumis super la reguloj de la akuzativo en esperanto kaj venis al la konkludo, ke ili estas facilaj? Kaj, tamen, en la praktiko ĝi daŭre stumbligas nin ĉiujn.

Povas esti, ke oni forgesu ĝin de tempo al tempo; sed ŝajnas, ke ekzistas alia malfacilo pli profunda. Ekzemple, kiam oni dubas inter la uzoj *La klaso de esperanto jam komencis* (erara) kaj *La instruisto komencis la klason antaŭ dek minutoj* (ĝusta). Estas evidente, ke la stumblilo kuŝas ne ĉe la akuzativo sed ĉe la kono de la radiko komenc'. La sama radiko ekzistas en la kataluna lingvo, ni analizu kiel ĝi (la radiko) funkcias. Ni formu la frazojn:

a) *El periode d'inscripció va començar ahir a les 8:00 del matí.*

b) *El forense començarà l'autòpsia quan arribi el cadàver.*

La apuda tabelo resumas kiel kondukas la kataluna verbo "començar".

En ambaŭ frazoj la verbo estis la **sama** (nur adaptis sian formon laŭ la konjugacio) kaj,

Frazo	Konduto
a) ne transitiva	sen rekta komplemento
b) transitiva	kun rekta komplemento

tamen, ludis du malsamajn rolojn: transitivan kaj ne transitivan.

El la sura analizo estas facile dedukti, ke la antaŭa lingvopraktiko de ĉiu unuopa kataluno forte influas ĝian regon de esperanto. Ni komparu kun la frazo *Petro manĝas pomon*: povas esti, ke oni forgesis la akuzativon; sed, pridemandite, neniŭ dubus pri la transitiveco de la verbo manĝi.

Similaj influoj rolas en aspektoj de la lingvo kompareblaj al tiu ĉi kaj tio veras ankaŭ por la parolantoj de aliaj latinidaj lingvoj. La verdikto, do, inkluzivas la senkulpecon de la akuzativo, la forigon de ĉiuj kulpoj kaj kulpigoj kaj la serĉon de novaj instrurimedoĵ kaj trukoj (artifikoj) por faciligi la lernadon.

Ramon Perera

CURS D'ESPERANTO A BARCELONA

Nivell inicial

Presentació:
dimecres 24/09/03 - 20:30h.

Barcelona Esperanto-Kontaktejo
Padilla, 196
08013 Barcelona
Tel./fax: 93 246 37 36

*Bonvolu atenti la ĥune senditan cirkuleron
ĥaj resendi la enĥetilon*

Tempesto super IEA

La esperanto-literaturo produktis en la lasta jardeko plurajn pli aŭ malpli skandalajn verkojn rekte celantajn konatajn figurojn de nia opereta lando. Ĉe ni oni devas teni sin tre singarde, kaj nepre malamikiĝi al neniu verkisto. Se iu havas tian misfortunon, la legantoj sendube dankos lian nepageblan servon al nia literaturo, sed li estos por ĉiam subridota per la ricevita karikaturna portreto. *La postdomo* de István Ertl certe apartenas al tiu elstara kolekto da satiroj, kvankam ĝi certe klasigeblas inter la plej mildaj.

En tiu maldika libreto diable kruciĝas diversaj fadenoj: Membron de la Centra Oficejo de la Internacia Esperanto-Asocio oni akuzas pri atenco kontraŭ novfaŝista gvidanto en lando regata de ties partio. Tiu oficejo fariĝas celo de la politiko forpelanta fremdlandanojn ekster la patrujajn limojn. Samtempe malkompetenta estraro klopodas reorganizi ĝin, dum aĉaj kanajloj klopodas per la plej mizeraj kalumnioj akiri postenon en ĝi.

La libro estas verkita de stil-majstro: temas ja pri la tradukinto de la *Stilekzercoj* de Raymond Queneau, kiu sorĉas nin kvazaŭ per ĝisdatigita eldono de *Specimene*. La aŭtoro mirinde ludas per ĉiaj lingvaj tavoloj kaj tre ridige parodias same kongresajn rezoluciojn, kiel la pompegan kakofonion de la *civitanaj* epistoloj, aŭ la fundamentismon de iuj pli zamenhofaj ol Zamenhofo, aŭ la lernantknabajn plataĵojn de verkistoj, sole elstarantaj pro sia rara devenlando... aŭ plurfoje eĉ sin mem. Vortludoj amasiĝas en ĉiu alineo, sed ili tute ne estas nur esperantaj: jam tuj en la komenco aperas konfuzo pri la nederland(ec)aj vortoj *banaal*, *bacchanaal* kaj *anaal*; poste oni mencias Fondajon *Cornuto* (anstataŭ Canuto), aŭ nomas *Contracepción* la ĉefurbon de Paragvajo, aŭ esperantistoj manifestacias per afiŝo tekstanta *Presoak kalera* kaj multegaj aliaj.

La libro fakte tipe postmodernas: ĝi plenplenas de aludoj kaj citaĵoj, pli aŭ malpli kaŝaj, verŝajne en ĉiu frazo. La libro mencias sin mem kiel jam aperintan verkon, kaj la aŭtoro en unu momento eĉ rekte alparolas la recenzantojn. Kiel en ĉiu postmoderna verko la leganto ne estas supozata ĉion kompreni, eĉ eble tre malmultajn el ĉiuj ĉi okulsignoj. Rekoninte unu, oni ridetas al si, sed ne multe gravas, se oni pretervidas la plimulton. Foje tamen estas iom malĝoje, kiam oni ne sukcesas solvi la enigmon pri iu mistera kaŝnomo, ĉu persona ĉu loka.

Spertuloj plenpulme ridegos, tamen legantoj nenion sciantaj pri la esperantaj literaturo kaj movado, same kiel pri la ĉeno de demisioj okazinta en UEA antaŭ du jaroj, verŝajne apenaŭ ĝuos la enhavon, kvankam eĉ neesperantisto komprenas perlojn kiel "IEA servas publikon kiu vicas antaŭ tombejoj en cent dek kvin landoj". La aŭtoro malkaŝas kelkajn sordidajn detalojn de la UEA-afero, sed malhavas la tipe mediteranean brutalon de siaj sudaj samĝenranoj. Ĉiel ajn Ertl tre saĝe avertas librokape, ke "pri ĉiu koincido de fikcio kaj realo respondecas la realo; fikcio estas, kiel ĉiam, senkulpa".

La libro tre belas: eldonejo Bero substrekinde plibonigis sian prezent-nivelon. Kaj la libro enhavas mirindan atuton: perfektajn bildojn faritajn de Francisco Veuthey.

Fine, mi deziras ion komenti eksterverke. La romaneto skurĝas la prezidanton de UEA, kiun la aŭtoro epitetas i.a. demagogo, tamen ĝi aperis dum la Universala Kongreso en Gotenburgo, ĝin disvendas UEA kaj petis recenzon por sia revuo al amiko de la aŭtoro. Gratulon! Tia akceptemo tute mankis al aliaj antaŭaj trafitoj de la venena plumo de niaj verkistoj –kaj mi havas enkape ĝuste iujn celitojn, kiujn fakte Ertl (kaj Veuthey) skoldas eble pli malmilde ol la burleskajn estraranojn de la Internacia Esperanto-Asocio kaj la abomenajn mistifikulojn ankaŭ ĉefrolantajn en la verko.

Hektor Alos i Font

